

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1996:2

## *”Esperantogården”*

Kommer det att bli  
den här anläggningens nya namn?





## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Junio 1996 • 84-a jarkolekto  
Fondita en 1913

### Redaktion:

Agneta Emanuelsson  
Kaisa Hansen (red. sekreterare)  
Franko Luin (teknisk redaktör)  
Bengt Nordlöf

### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [espero@esperanto.se](mailto:espero@esperanto.se)

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: H-A Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 1996: 150 kr.

Gävoprenumeration till utlandet: 80 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-  
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
<http://www.esperanto.se>

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1996:

Direktansluten medlem 150 kr.  
Famijmedlem (utan tidning) 60 kr. Ungdomsmedlem  
(max 20 år) 60 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund  
och får dess tidning *Kvinpinto*.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

E-post: [eldona@esperanto.se](mailto:eldona@esperanto.se)

Hemsida: <http://www.esperanto.se/eldona>

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,  
Seminariegatan 3 A, 752 28 Uppsala

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

# Esperantolinjen i Karlskoga

19/8-11/10

Nybörjarkurs

21/10-20/12

Fortsättningskurs

Varje termin börjar med en 8-veckors nybörjarkurs. Undervisningen är helt på esperanto och vi börjar med bilder och enkla strukturer. Efter en vecka skriver du en liten uppsats och snart kan du kommunicera med alla deltagare på esperanto.

Efter åtta veckor kan du börja i fortsättningskursen, dit också elever ansluter sig som redan har lärt sig språket. Umgänges- och arbetspråket är självklart esperanto eftersom många kommer från andra språkområden. Kurslitteratur, tidningar, övningar i inlärningsstudio, föreläsningar, information och inläring via sång är givetvis på esperanto.

Karlskoga Folkhögskola har blivit ett internationellt esperanto-centrum med esperanto-linjens 8- eller 16-veckorskurser. Hit har också tidigare förlagts Svenska Esperantoförbundets kongress och TEJOs världskongress.

Vi välkomnar varmt utländskt deltagande! Ett 35-tal nationer har redan deltagit i våra kurser. Med din medverkan lär du dig inte bara mer utan manifesterar även betydelsen av det internationella språket esperanto, som neutralt och internationellt arbetar för allas rätt till egen språkkultur, jämlikhet och rättvisa mellan folken – en förutsättning för fred på jorden.

Beställ informationsblad/anmälningsblankett från

Karlskoga Folkhögskola, 691 24 Karlskoga  
tel: 0586-50360, fax: 0586-37077  
e-post: [alla@khasfs.se](mailto:alla@khasfs.se)

INTERNACIA SUKCESO!

ETIMOLOGIA VORTARO  
DE ESPERANTO

N **de Ebbe Vilborg** R  
Volumo 4 furoras  
Prezo: 150 kr  
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Postgiro 578-5



# "Esperanto-kursejo" — blir det verklighet nu?




Bild av den blivande "Esperantogården" i Lesjöfors? Ännu vackrare under sommaren än i vintras när Lennart Svensson tog denna bild.

I samband med Esperantoinstitutets seminarium i Karlskoga i mars gjorde ett 20-tal intresserade ett besök i Lesjöfors. Det gällde en eventuell kursgård för esperantorörelsen.

"Fridhem" har varit ålderdomshem, för några år sedan genomgripande upp- rustat av invandrarverket för dess behov. Nu står det tomt och kommunen vill sälja.

Skulle det passa sveriges esperantister? En egen kursgård är ju ett gammalt önskemål.

Ett allmänt intryck vid besöket var nog att anläggningen, även om den inte i alla avseenden är helt idealisk, med ganska måttliga förändringar skulle kunna på ett bra sätt fylla behovet av en kursgård.

Det är nog en allmän mening att enbart esperantorörelsens resurser inte räcker för att driva en egen anläggning. En lösning vore att driva kursgården i kombination med vandrarhem — med skolresor som ett viktigt inslag. Därmed skulle man kunna få det hela att gå runt och även lämna ett överskott att användas för spridandet av esperanto.

För det hela talar bland annat att ideella krafter med tillräcklig sakkunskap finns tillgängliga, att kommunen är välvillig och dessutom att både läns- och centrala myndigheter har fonder för utveckling i området. Vidare har EU anslagit stora belopp för denna beslagsregion, pengar som söker efter bra projekt.

Den senaste tiden har mycket hänt. Ett rundbrev från Lennart Svensson, motorn i det hela, resulterade i att en del pengar ställdes till förfogande av landets esperantister som en grund-

plåt. Och den 28 maj ombads jag att tillsammans med Lennart besöka Svenska Turistföreningen (STF) i Stockholm. Samtalen om etableringen av "Esperantogårdens vandrarhem" i Lesjöfors blev mycket lovande.

Ett SJF-emblem på huset är ju i sig ett kvalitetsmärke. Men inte minst viktigt för esperan-

tister är att STF — om det blir av — marknadsför Esperantogården både i Sverige och internationellt.

## Ekonomisk förening

Samma kväll — tisdagen efter pingst — var Stockholms esperantister inbjudna till information på Esperanto Centro. Även detta möte hölls i mycket positiv anda. Det resulterade i beslut att tillsätta en interimsstyrelse för att förbereda en ekonomisk förening för driften av kursgården och vandrarhemmet.

Interimsstyrelsens huvuduppgifter — förutom en del rena organisationsfrågor — är att utarbeta kalkyler för investeringar och drift samt att kalla till en konstituerande stämma. Se separat kallelse. Vidare har, när detta läses, förhandlingar inletts med Filipstads kommun.

På återseende på den konstituerande stämman.

Bengt Nordlöf

## Mi bonvenigas la iniciaton pri nova Esperanto-kursejo!

Dum kelka tempo esperantistoj diskutis pli-malpli reale pri Esperanto-kursejo en Lesjöfors. Pere de entuziasma laboro de Lennart Svensson montras sin nun ebleco malmultekoste aĉeti la priparolatan domon en Lesjöfors kaj kunlabori kun STF, la Sveda Turista Asocio, kiu havas interesan kontaktreton kaj multe da sperto pri organizado

Ĉu ne sonas bele kaj instige: **Bonvenon al STF — Esperantogården!** Mi vidas en tiu loko estontajn kursojn je akcepteblaj prezoj kaj bonaj kondiĉoj; povos tie okazi someraj kursoj internaciaj, nordiaj renkontiĝoj, junularaj kunvenoj, lernejoj ekskursoj diverslongaj, seminarioj, informvesperoj kun vizitantoj, turistoj, pensiuloj, vintroferiantaj gestudentoj, homoj, kiuj ŝatas ekscitan sovaĝejon, ktp.

Mi vere apogas la laboron de la grupo, kiu nun plulaboras por realigi la planojn. Mi helpas al ili laŭ mia ebleco kaj mi absolute ne sentas iun malhelpon al mia laboro en Karlskoga. Male! La du agadoj — en Karlskoga kaj Lesjöfors certe povos apogi kaj kompletigi unu la alian. Mi ege ĝojas pri tiu promesoplana iniciato.

Lars Forsman

gvidanto de la Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo

## KALLELSE

till konstituerande sammanträde med "Esperantogården" ekonomisk förening.

**Tid:** söndagen den 30 juni kl. 12

**Plats:** Gärshedens Folkets hus, Skansen, Stockholm.

Samtliga intresserade — esperantister eller ej — är varmt välkomna. Före och efter mötet finns möjligheter att äta och dricka kaffe på någon av Skansens serveringar — eller inta medhavd förtäring på gräsmattan bakom Folkets hus.

**Obs:** meddelar man vid grinden att man ska besöka esperantomötet i Folkets hus så är inträdet till Skansen gratis.

Interimsstyrelsen



# Iom konciza raporto pri ne tiom konciza kongreso

*Iasence la ĉijara jarkongreso de SEF en Katrineholm estis pli longa ol kutime. Jam en la vendredmateno okazis podia diskuto – ekster la kongresa programo, sed teme ligita al nia kongreso – kun ĉeesto de la radio kaj almenaŭ du klasoj da gimnazianoj el Katrineholm.*

**Kenneth Larsson**, kiun la registraro komisiis kunordigi la laboron pri la rolo de la sveda lingvo en Eŭropa Unio, funkciis kiel gvidanto de la diskutoj kaj gvidis ĝin, post la komencaj sinprezentadoj kaj ĝeneralaj opiniesprimoj al diskutado pri la eblecoj de esperanto en tiu medio.

El la diskutantoj kelkaj nur prezentis sian fakon kaj ne havis opinionon pri esperanto, kio ne malaltigis la valoron de la diskutoj. Nur unu estis skeptika pri esperanto, la verkisto **Ernst Brunner** el Stokholmo, fiera pri siaj vastaj lingvokonoj. El la ceteraj montris plejan komprenblon pri la estonta rolo de esperanto (sed ne senrezerva!) la politikisto **Birger Schlaug**, parlamentano de la Verduloj.

Nur unu esperantisto estis inter la podianoj, profesoro **Christer Kiselman** el Upsalo, kiu venis speciale por la diskuto. Sed estis donita ebleco al la publiko interveni, kaj la lasta parto temis ekskluzive pri esperanto. Ankaŭ post la diskuto la ĉeestantaj esperantistoj kaptis la okazos pridiskuti lingvopolitikajn demandojn kun la podianoj.

Ekster la diskutsalono eblis konatiĝi kun esperanto kaj la 90 jaroj de SEF per ekspozicio kaj kolekto da informiloj.

## Sveda jarkongreso

La pli strikta kongreso komenciĝis en la posttagmezo per malfermo de la ĝiĉeto

kaj libroservo kaj alveno de la ceteraj kongresanoj al la *Urba hotelo*, kiu funkciis kiel kongresejo kaj loĝejo. La ĉefa kunveno ne estis speciale granda, sed tute taŭga por la dimenzio de nia kongreso.

Kadre de la kongreso okazis almenaŭ kvar jarkunvenoj: tiuj de SEF kaj SEJU, de Eldona Societo Esperanto kaj de la sveda sekcio de ILEI, per kio grandparte pleniĝis la kongresa programo de la sabato.

Unua en la vico estis la jarkunveno de Eldona. La jarraporto povis rakonti pri la translokigo de la librostoko de Malmö al Bromma kaj eldono de la kvara volumo de *Etimologia Vortaro* de Ebbe Vilborg. Ioma ekonomia pliboniĝo estas rimarkebla. La estraro estis reelektita kaj la prezidanto daŭre havas la nomon **Tomas Jansson** (**Bertil Nilsson** estas ĝia sekretario kaj **Lennart Lagerkrantz** kasisto).

La instruistoj diskutis en sia kunveno la bezonon de kursoj, precipe de kursoj por lingvoinstruado, kaj pli konkrete kiel realigi ilin.

SEJU decidis ĉijare jarkunveni kune kun SEF. Ankaŭ ĝia estraro estis reelektita. La ĉeestantaj estraranoj, loĝantaj dise tra la lando, uzis la tempon en Katrineholm por pridiskuti diversajn junularajn agadojn, i.a. junularan korespondan kurson kaj novan presitan informilon.

Dum la jarkunveno de SEJU la ne

tiom junaj kongresanoj havis la eblecon konatiĝi iom kun la centro de Katrineholm. La gvidita promeno finiĝis en la "distanclernejo", kie pluraj komputoroj estis kuplitaj al interreto. La vizitantoj povis mem retumi kaj konatiĝi kun la ampleksa interreta informejo de SEF.

## Jarkunveno de SEF

La jarkunveno de SEF estis, kiel kutime, bone reĝisorita. La jarraporto ŝajne sufiĉe detale prezentis la agadon de la antaŭa jaro, tiel ke ne okazis multaj demandoj.

Kelkaj ŝanĝoj estas en la konsisto de la estraro. Post la elektoj kaj estrara dividado de taskoj la estraro estas jena: **Roland Lindblom**, prezidanto, **Franko Luin**, vicprezidanto, **Börje Andersson**, kasisto, **Kaisa Hansen**, sekretario, **Anita Bergh**, vicsekretario, **Jill Hillford**, turneoj, **Fredrik Olofsson** (nova), junularo, **Agneta Emanuelsson**, **Bengt Nordlöf** kaj **Henning von Rosen** (nova).

Estis kvar proponoj de diversaj kluboj kaj oni akceptis ilin post diskutoj. Estis ankaŭ decidita malgranda altigo de la kotizoj por 1997.

## Cetera programo

Sed la kongreso estis ankaŭ eduka kaj amuziga. La unuan parton plenumis **John Wells**, antaŭa prezidanto de UEA, prelegante al ni pri fonetiko, kaj **Agnés Morardini-Harrach**, kiu prezentis detale la signifon kaj agadon de la unua prezidanto de SEF, **Valdemar Langlet**. La dimanĉa ekskurso ankaŭ celis plikonatiĝon kun Langlet.

Por la amuziga flanko ni zorgis parte mem, ekzemple per kunkantado dum la "interkona" vespero, sed precipe ni ĝuis la tonojn de *Trattbandet* de **Kaj Stridell**, kiu muzikis por ni en la sabata vespero (kaj kantis parte en esperanto). Ĝi estis, cetero, kunarangito kun la ĵazklubo de Katrineholm kaj ABF.

La informa valoro de la kongreso estis tre granda. Antaŭ, dum kaj post ĝi aperis abundaj artikoloj en la loka *Katrineholms-Kuriren*. Pri la podia diskuto rekte raportis la loka radio.

Ne eblas preterpasi la nomon de **Agneta Emanuelsson**, sen kiu ne estus okazinta la kongreso en Katrineholm, kaj ankaŭ ne de la klubanoj de Norrköping, kiuj abunde helpis ĝin.

Franko Luin

*Kio taŭgas por somero,  
ne taŭgas por vintro.*

[ ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPSNITTET KIS CLASSICO KURSIV, TECKNAT AV FRANKO LUIN 1993 ]



OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.  
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto  
och andra språk.



PRETERE

La Esperantoklubo de Skövde volas jam nun anonci, ke okazos semajnfina kurso la 12-an - 13-an de oktobro.

Ĝi turnas sin al infanoj, komencantoj kaj daŭrigantoj.

Atentu la anoncon en la venonta numero (3-4) de La Espero.

## Nova prezidanto en Skövde

La Esperanto-Klubo de Skövde dum sia jarkunveno elektis Torsten Hammargren kiel nova prezidanto. La ĝisnuna prezidanto Karl-Gustav Gustafsson petis pri liberigo pro sia nun tre streĉa laboro kiel kriminalinspektoro.

En la estraro restas Kurt Frisk, vicprezidanto, Sten Broman, Hilgon Frisk kaj Carl-Erik Ohlsson. La klubo havas nun 57 membrojn. Estis pluraj kursoj, inter alie tutlandaj semajnfinaj organizitaj de Gunnar Olsson.

## Pikniko en kastela parko

La Esperantoklubo de Tyresö finis sian printempan agsezonon per pikniko en la kastela parko de Tyresö la 8-an de junio. Kio estis unufoja aranĝo por festi sian 20-jariĝon en 1995, riskas fariĝi ĉiujara tradicio, al kiu ankaŭ la membroj de la ceteraj esperantokluboj de la stokholma regiono estas invititaj.

Tute neformala kunestado dum belega suna posttagmezo donis al la esperantistoj eblecon malstreĉiĝi kaj iasence prepari sin por la someraj alkongresaj vojaĝoj.

## Om esperanto i Utbildningsradion

Utbildningsradion planerar att senda en kurs om esperanto under december -96 och januari -97. Om intresset är stort kommer kan det bli aktuellt med kurser i själva språket i radio och eventuellt senare TV.

Programmet kommer delvis att spelas in under junikursen i Karlskoga.

## Klassresa till esperantoslott

Klass 9A i Hjulsta har kunnat förverkliga sina planer att göra en klassresa till esperanto-slottet Gressillon i Frankrike. Klassen har på eget initiativ läst esperanto sedan i höstas. Under vistelsen har eleverna kunnat fördjupa sina språkkunskaper, bl a genom kontakter med samåriga elever från Frankrike och Polen som vistades där samtidigt.

Eleverna har själva samlat ihop en hel del av respengarna genom olika aktiviteter, vilket förstärkt sammanhållningen i klassen. Återstoden kom från olika fonder, bl.a. en EU-fond för ungdomsutbyte och från några esperantoorganisationer i Sverige.

## Tejo Tegmente

Eŭropa Kunordiga Buroo, EKB, estas tegmenta organizo por ĝis nun 35 internaciaj junularaj organizoj. Plej alte sur tiu tegmento nun troviĝas esperantisto, 22-jara sveda studento: Ralf Gion Fröhlich. En marto ĉi-jare, kiel TEJO-representanto, li elektigis prezidanto de EKB.

La kaŭzo ke li entute kandidatigis estis ke la politikaj junularaj organizoj ne povis interkonsenti pri iu kandidato el iliaj organizoj. Tiel fariĝis politika vakuo, kiu nur estis forigebla per neŭtrala kandidato.

Sed ankaŭ alimaniere TEJO en la lasta jaro grimpis la Eŭropajn organizajn (struk)turojn, unue, per elektiĝo al la Konsultiĝa Komitato de Konsilio de Eŭropo, kaj due, TEJO membriĝis en Junulara Forumo de EU.

Pri sia prezidantiĝo Ralf diras "TEJO gajnis grandan prestiĝon per mia elektiĝo, des pli ke ĝi okazis ĝuste pro mia esperantisteco. Kaj, kompreneble mi havas tre multajn okazojn konsciigi aliajn homojn pri la lingva problemo."

Rilate la esperantoagadon li rimarkigas: "Ĉe ni, esperantistoj, fakte dependas nur de ni ĉu ni sukcesas konigi niajn idealojn kaj atingojn. Ni mem ofte forgesas la esceptan valoron de aferoj kiel senproblema komunikado trans lingvobaroj, Pasporta Servo, la revuo Kontakto, kiel forumo de gejunuloj el la tuta mondo, sen kutimaj tordoj de la amaskomunikiloj." Kaj li substrekas la paralelecon inter tiaj atingoj kaj la strebado de la Eŭropaj institucioj por libera moviĝado, sinesprimo k.s.

Cetere li opinias ke la amaskomunikiloj trompiĝas kiam ili prezentas junulojn kiel senidealecajn, kontraŭe, diras la prezidanto de EKB, "gejunulojn plu altiras idealoj".

## Esperanto som skolämne

Vid Sandagymnasiet i Huskvarna introduceras läsåret 1997/98 ämnet Esperanto C, kurs A, 60 poäng. Kursen är ett led i ett projekt kring esperanto som jag av skollärdningen har fått tillstånd att genomföra. I projektet ingår också en utställning i medieteket veckorna 40-44 1996.

Eleverna har visat ett visst intresse för esperanto när de väl får veta vad det internationella språket är. Ett dilemma i det här sammanhanget är dock att esperanto ännu inte har någon officiell status som skolämne i Sverige, eftersom vi saknar högskoleutbildning av esperantolärare.

Det angelägnaste just nu är kanske att vi med fakta som underlag visar våra skolpolitiker att esperanto är ett språk att räkna med och att det förtjänar att få en seriös och vetenskaplig behandling.

En betydelsefull faktor i arbetet att få esperanto erkänt kan vara att vi informerar eleverna om esperanto och försöker få igång en viss kursverksamhet i skolorna. Detta kan skapa en opinion från elevernas sida för esperanto och därmed bli ett incitament för våra politiker att ta UNESCOs resolutionen angående införandet av esperanto i studieprogram på allvar.

Rolf Nordström

*Vi vet vad du gör den 14 och 15 september i år. Vill du också veta det? OK! Vi säger det bara för att det är du.*

*Du kommer att vara i Skövde på en veckoslutsträff som blir just så rolig, intressant, spännande, varierande, jobbig, allvarlig, tokig som du själv gör den till.*

*Kom på lördan kl. 10 och stanna till söndan ca kl. 15. Vad vi kommer att göra däremellan bestämmer vi gemensamt.*

Ring 0500-41 64 51 (Gunnar) eller 0500-48 55 46 (Carl-Erik) för information och anmälan. Eller faxa ditt namn och telefonnummer (fax 0500-48 62 87).

Skövde Esperantoklubb





# Norvegoj pozitivaj al esperanto

## Sed la plej grava celgrupo plej senscia kaj malfavora

*Norvega Esperantista Ligo (NEL) mendis opini-enketon por ekscii pri la sinteno de la norvegoj rilate al esperanto.*

*Ĉar niaj du landoj (Norvegio kaj Svedio) estas tre similaj kulture kaj ekonomie, eblas supozi, ke enketo farita en Svedio venus al tre simila rezulto.*

*Jen la norvega enketo, kiel ĝi estis prezentita en Norvega Esperantisto:*

La rezulto de la enketo pri kono kaj sinteno pri esperanto farita por NEL (Norvega Esperantista Ligo) estas por ni pozitiva. Sed nia plej grava celgrupo, junuloj, scias plej malmulte pri esperanto. La junuloj kiuj scias pri esperanto tamen ne konsideras ĝin tre utila.

Sume 59 procentoj de la norvegoj scias, ke esperanto estas lingvo. Sed nur kvin elcentoj de tiuj kiuj scias, ke ĝi estas lingvo konsideras ĝin "tre utila". Tamen 41 elcentoj konsideras ĝin "utila", sed malfacile realigebla, do entute 46 elcentoj de tiuj kiuj scias, ke esperanto estas lingvo havas favoran sintenon rilate al esperanto, dum 43 elcentoj konsideras esperanton senutila.

Ni ankaŭ konstatas, ke maljunuloj scias pli pri esperanto ol junuloj, kaj ke la scio proporcias al la edukado.

La ciferoj ankaŭ diras al ni, ke tiuj kiuj havas altan formalan edukon malpli favoras esperanton ol tiuj kiuj havas modestan aŭ neniun edukon.

Jen la ĉefaj rezultoj de la enketo kiun faris Opinion A/S por NEL. La enketa firmao estas unu el la prestiĝaj institu-

toj kiujn ankaŭ uzas la ĉefaj gazetoj, radioj kaj televidoj por enketi pri ekzemple politikaj sintenoj.

### Ne malamike

Estas priĝojinde, ke la enketo malkovris relative altan scion pri esperanto, kvankam oni malmulte traktis ĝin en la ĉiutaga amaskomunikila bildo. Ankaŭ priĝojindas, ke la plimulto de tiuj kiuj scias, ke esperanto estas lingvo, estas pozitivaj rilate al ĝi. Oni do ne povas konkludi je malamika sinteno fronte al esperanto en Norvegio, kiel kelkaj homoj timis.

### Mezuri niajn atingojn

NEL faris la enketon por plenumi decidon de la landa kongreso lastjare. La kongreso decidis, ke ni informu tiom bone pri esperanto, ke la plimulto de la loĝantoj en Norvegio en la jaro 2000 scios almenaŭ, ke esperanto estas lingvo. Por havi la eblecon mezuri ĉu ni informis efike, ni devis esplori inter la loĝ-

antaro de Norvegio kiom da homoj jam havas tiun scion. Post kvin jaroj ni faros la saman enketon por esplori ĉu niaj penoj efikis.

Efektive, jam nun pli ol duono scias, ke ĝi estas lingvo. La supozo de la strategi-verkantoj do estis tro modesta. Tamen la "strateĝoj" pravis pri la scio kaj la sinteno de la plej juna parto de la loĝantaro: Ni fakte troviĝas en la iom malagrabra siutacio, ke la plej grava celgrupo estas la plej senscia kaj plej malfavora.

### Certeco

Krom la relative vasta scio pri esperanto la enketo apenaŭ donis al ni scion kiun ni ne jam povis iel senti. Tamen, nun ni scias pri la sintenoj de loĝantoj en Norvegio. Antaŭe ni supozis. Supozo ne necese ĝustas, tial estas utile de tempo al tempo kontroli per science plenumita enketo.

Nia plua paŝo nepre estu informa laboro.

Torstein Kvakland

## LA ENKETO EN CIFEROJ

Konforme kun la decido de la landa kunveno, ni mendis en januaro tutlandan opini-enketon. Farinte fundajn sondojn pri la prezoj ĉe pluraj profesiaj firmaoj, ni elektis Opinion en Bergen.

Al 1000 hazarde elektitaj homoj tra la lando Opinion telefone faris la demandon:

### 1. Hva forbinder du med esperanto?

*Kion vi asocias kun esperanto?*

Entute 585 (59%) povis respondi almenaŭ, ke esperanto estas lingvo. 7% kredis, ke ĝi estas fabrikmarko, filozofia afero, ia artaĵo aŭ io alia. La ceteraj 36% asociis nenion specialan.

Ke ĝi estas lingvo sciis 61% de la viroj, kaj 56% de la virinoj.

<i>Laŭ aĝo:</i>	
-30	37%
30-44	58%
45-59	69%
60-	68%

<i>Laŭ postbaza edukado:</i>	
neniu	32%
1-3 jaroj	48%
4-6 jaroj	68%
pli ol 6 j.	88%

<i>Laŭ profesio:</i>	
Laboristo	46%
Kontoristo	79%
Memstarulo	66%
Bienulo/Fiŝkaptisto	44%
Lernanto/studento	33%
Invalido/pensiulo	65%
Hejmrestanto	46%

<i>Laŭ enspezo:</i>	
<i>Jarenspezo de la tuta domanaro</i>	
-200 000	56%
200-300 000	53%
300-400 000	58%
400-500 000	70%
500 000-	78%

<i>Laŭ politika opinio:</i>	
<i>Maldekstraj partioj</i>	
RV	*89%
SV	77%
Ap	57%

<i>Centraj partioj</i>	
V	83%
Sp	46%
KrF	57%

<i>Dekstraj partioj</i>	
H	66%
FrP	53%

Al tiuj, kiuj sciis almenaŭ, ke esperanto estas lingvo, ili faris la duan demandon:

### 2. Hvilken oppfatning har du av esperanto som språk?

*Kiel vi prijuĝas esperanton kiel lingvon?*

Ĉu vi opinias ke...	
- esperanto estas lingvo tre utila	5%
- esperanto povas esti utila, sed estas malfacile realigebla	41%
- esperanto estas lingvo nenecesa	43%
- Neniu opinio	11%

\*Lingvo nenecesa\* opiniis 49% de la viroj, sed nur 36% de la virinoj; 51% de tiuj sub 30 jaroj, sed nur 34% de tiuj super 60; 37% de tiuj sen postbaza edukado kontraŭ 50% de tiuj kun pli ol 6 jaroj.

\*Tre utila\* esperanto estas laŭ 10% de la pensiuloj kaj invalidoj, 4% de la ceteraj.

\*Nenecesa\* ĝi estas laŭ 55% de tiuj, kies domanaro enspezas plej multe; laŭ 38% de tiuj, kies domanaro enspezas malplej.

La raporto enhavas kompletajn tabelojn pri la respondoj de la demanditoj en la supremencitaj kategorioj, kaj kelkaj aliaj, malpli aktualaj (ekz. membreco en sindikatoj). Sed en pluraj kazoj la nombro de la demanditoj estas tre malalta, tiel ke ni tie nepre estu tre singardaj tirante konkludojn.

Douglas Draper

\*nur 9 demanditoj



# Esperanto kaj vulkanoj – kaj kelkegaj gutoj da pluvo

*"Via mendita hotelo estas plenplena. Ĉu vi konsentas pri pli malmultekosta hotelo?" Mi aŭdis voĉon de Antonio Leone de Leon, kiu telefonis al mi el fora Kostariko. Surprizita, ke San José preskaŭ translokiĝis al mia propra loĝejo, mi senhezite jesis. Post du tagoj ni, Anita Bergh kaj Agneta Emanuelsson, jam estis survoje al Centra Ameriko.*

La cirkonstancoj devigis nin vojaĝi ne rekte al la kongreso. Ni ĝuis unue hispanlingvan interkonan vagadon. Tio estas: ni vagadis, la cetera mondo parolis hispane. Tuj post la alveno al Panamurbo ni iris rigardi la faman kanalalon. Estas vere inĝeniera mirindaĵo kun interesa historio. Nia fama kanal-konstruisto Baltzar von Platen spertis siajn malfacilaĵojn, sed li ne bezonis batali kontraŭ malariaj moskitoj, kiel devis fari la franco Ferdinand de Lesseps. De Lesseps malsukcesis kaj la kanalalon finkonstruis la amerikanoj, kiuj saĝe unue ekstermis la moskitojn. Boatante sur la kanalo ni admiris ĝian grandecon kaj la kuraĝon de la pasintaj viziuloj! Sed Ĝöta kanal estas multe pli longa...

En Panamo troviĝas vulkanoj. Ni senprokraste akceptis la defion kaj forlasis la varmegan Panamurbon por la montaro. Kiel ni povus scii, ke la vetero tie estas tre ofte malbona? Ni ne de-

senlaciĝeme tien kaj reen sub la sunbrilo.

Tempo flugis kaj ni denove aŭtobusis tra la parada monta pejzaĝo por ne maltrafi la kongreson en San José, okazanta inter la 12-a kaj 17-a de februaro 1996. Facile ni trovis nian hotelon, ĉar la priskribo, kie ĝi situas, estis fakte la adreso! Poste ni komprenis, kiel bonŝancaj ni estis.

La solena malferma ceremonio de la kongreso okazis en la urbocentro, en flava domo kun taŭgaj ciferoj 1887 surmure. Pluvegis, kompreneble, kaj ni decidis iri tien per taksio. Preskaŭ unu horon poste ni revenis al nia hotelo, ĉar la ŝoforo ne sciis, kie troviĝas la Departemento de Junularo kaj Sporto. Ne li bezonis iri tien, sed ni. Sekve, ni devis koni la vojon, ne li. Mirinda logiko!

Fine ni tamen estis en Esperantujo kaj senprobleme interparolis kun ĉiuj. Ĉeestis kvindek esperantistoj el dek

netikaj eraroj ĉe hispanlingvanoj".

La universitato de Kostariko en San José provizis nin ne nur per kongresejo, sed ankaŭ per aŭtobusoj por ebligi vizitojn al la Universitato por la Paco, la ĝardeno Lancaster kaj – tre taŭga en varma lando – bierfabriko. Ni ĝuis koncerton de Teresita Ines Alaniz el Argentino, kaj belvestita dancgrupo montris popolajn kostarikajn kamparajn dancojn, kiuj estis kaj gajaj kaj laŭtaj.

La planita postkongresa ekskurso al Tortuguero ne okazis, ĉar pro la pluvego la regiono inundigis. Ŝajnis strange, ĉar en San José la suno brilis kaj la temperaturo de la aero estis perfekta.

Ni decidis tenti la sorton, kaj luis aŭtobuseton por esplori la kostarikaj vulkanojn. Sep kuraĝaj kaj gajhumoraj gesperantistoj gvidataj de Carlos Salazar Alvarado el Kostariko frue matene ekvojaĝis al la ne plu aktiva vulkano Irazu, 3432 m alta. La impona grandeco de la kratero entenanta flavan akvon je la fundo estas nepriskribebbla. Ni tamen daŭrigis supren laŭ la mallarĝa montokresto, ĉar tie estas la limo inter la du oceanoj. Dum klara tago eblas vidi la Pacifikan kaj Atlantikan oceanojn, sed al ni, bedaŭrinde, malhelpis la vidadon la nuboj. Ni do estis super ili en la ĉielo!


La rekta vojo ien ajn kutime estas la plej mallonga, sed la nekonata vojo ofte estas pli interesa. La duan tagon ni elektis nekonatan vojon, kiu iris tra vilaĝetoj, kafplantejoj, pluvbarbo kaj ni venis al la vulkano Poas, nur 2704 m alta. Ĝi estas iom aktiva kaj oni povas flari sulfuron. La akvo en la kratero estas smaragde verda, koloro tre malsimila al la obtuzaj brunaj, verdaj kaj grizaj nuancoj de la ĉirkaŭaĵo. Nur la blua ĉielo kaj lilaj floroj konkuris kun al akvo pri kolorriĉo.

Venis la tempo forlasi Esperantujojn kaj re-enplonĝi en la hispanlingvan mondon survoje hejmen. En Nikaragvo ni ne povis regi nin, sed uzis nian solan tagon tie por viziti la aktivan vulkanon San Sebastian. Aŭ ĉu estis la infero? Fakte tiel aspektis!

La posta boatumado sul la Nikaragva lago kaj la manĝado de testudovoj trankviligis kaj fortigis nin. Ni tamen interkonsentis, ke ni flugu hejmen kaj ne plu estu proksime al iu ajn vulkano, ĉar laŭ nia skemo ĝi estus erupciaanta!

Anita Bergh  
Agneta Emanuelsson

Carlos Salazar Alvarado, Kostariko, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, Brazilo, kaj Juan Ramon Rodriguez, Kubo  
(Fotis Anita Bergh)



mandis pri tio en la Ŝtata Turisma Informejo, sekve neniu informis nin. Tra la pluvego je la alteco de 2800 m ni klopodis vidi la vulkanon, sed vane. Ni vidis nur malgrandan kolibrion, kiu feliĉege suĉis nektaron el flavaj floroj. Ĝi preskaŭ interkomunikiĝis kun ni montrante, ke akvo estas vivo, ĉu ne?

La postan tagon ni veturis malsupren al la marbordo. Ni komprenis, ke la temo de nia vojaĝo estas akvo. Sed ĝi povas esti diversspeca! La varmega Pacifika Oceano salutis nin per grandaj, fortaj, senĉesaj ondoj, kiuj portis nin

unu landoj de la amerika kontinento, kaj el ses eŭropaj landoj. Regis amikeca kaj laborema etoso aktiviganta ĉiujn. Dum la kunsidoj de "Amerika Agado" oni vigle debatis kaj diskutis similajn kaj malsimilajn problemojn de la movado en la granda kontinento kun tiom malsimilaj kondiĉoj. Krome ses homoj sukcese ekzameniĝis; okazis kunsido pri informado gvidata de Ursula Grattapaglia el Brazilo; Luis Santos-Morales el Kolombio prelegis kun granda entuziasmo kaj scio pri la temo "Kiel plialtigi la memestimon" kaj "La plej oftaj fo-



## Memore al Lennart Åberg

Marde la 19-an de marto atingis nin tragika sciigo: **Lennart Åberg** mortis. Per tio finiĝis 83-jara vivo, kiu estis plena de aktiveco en diversspecaj kampoj.

Lennart naskiĝis la 7-an de aŭgusto en la jaro 1912 en Götlunda en malriĉa familio, sed sian fruan junaĝon li pasigis en Skövde, kien li revenis post kelkaj jaroj aliloke. En la jaro 1953 li fariĝis personara konsilanto en Volvo-Skövde-verken kaj ankaŭ poste respondecis pri la personara gazeto. Pro granda sinofero por homoj, kiuj petis lian helpon kaj multe da aliaj okupoj lia koro komencis protesti kaj en la jaro 1963 li devis rezigni pri sia ŝatata laboro.

Ĉar Lennart ĉiam ŝatis helpi al homoj, li mem fartis bone kiam li povis helpi. Ekzemplo de tio estas, ke eĉ kiam li pro tuberkulozo estis en sanatorio, li tie starigis informojn por helpi al la


malsanuloj pri iliaj ekonomiaj kaj aliaj problemoj.

Krome li aktive laboris por societo de kor-kaj pulm-malsanoj, li estis distrikta sindiko por ABF (La laborista kleriga asocio), li estis komunuma deputito kaj laboris por la UN-asocio, sed antaŭ ĉio li aranĝis amasojn da studrondoj; en kunventekniko, librotekado, socia scio ktp, kaj pri esperanto.

Esperanto estis ekde lia 16-a jaro lia plej ŝatata kaj favorata okupo. Tuj post la unua kontakto kun la lingvo, la ideo lin kaptis. De decembro 1933 ĝis 1969 Lennart estis aktiva membro en la Esperantoklubo de Skövde kaj dum longa periodo estis ĝia prezidanto. Dum tiu tempo estis multaj turneoj kun gastprelegantoj, kiujn li mem akompanis kaj tradukis, li starigis viglan studadon, aranĝis plurajn SEF-kongresojn en la urbo en modele bona maniero ktp.

Similan laboron Lennart daŭrigis post la translokiĝo al Gotenburgo en la jaro 1969. Ne eblas ĉi tie menci ĉion, kion li faris; li ja ankaŭ apartenis al la SEF-estraro kaj laboris en la internacia movado. Ĉi tie, en Gotenburgo, certe ĉiuj memoras la multajn grandajn kaj belajn ekspoziciojn diversloke en la urbo, la amasiĝon de infandeseĝnaĵoj, poste venditaj favore i.a. al Bona Espero en Brazilo, la multajn semajnfajnajn kursojn kaj aliajn studrondojn, kaj ĉiujn prelekturajn kun eminentaj prelegistoj. Fine ni volas nur menci ke li ankaŭ estis LKK-prezidanto dum la SAT-kongreso en Gotenburgo en la jaro 1976. Jen nur parteto de menciindaj aferoj.

Nun Lennart estas for de ĉi tiu mondo. Sed lia memoro longe vivos inter ni kaj ĉiuj gesamideanoj ĉirkaŭe en la mondo. Niaj pensoj iras ankaŭ al lia familio. Li havis naŭ infanojn, pri kiuj li ĉiam estis fiera, same pri Aino, lia tria edzino, kiu estis lia apoganto kaj bona kunlaboristino la lastajn jardekojn. Vi sci, ke la bildo de Lennart estas hela, kaj ke lia laboro estas daŭrigota; li ne vane batalis por niaj ideoj.



## Samideano forpasinta

**Karl-Axel Andersson**, Strängnäs, ne plu paŝas inter ni. La Lingvo Internacia ludis en lia vivo gravan rolon, kaj unu el liaj lastaj pensoj iris al liaj amikoj dise en la mondo.

Li forpasis jam en julio 1995. La redakcio bedaŭras la malfruan aperigon, sed ĝi nur nun eksciis pri lia forpaso.

## DONACOJ

MEMORE AL LENNART ÅBERG  
sume 4975 kr de:

Gun k Anders Karlsson, Göteborg; Mats Karlsson, Skövde; Carin, Per-Åke, Gustav Bjurholm, Skara; Sten Broman, Skövde; Skövde Esperantoklubb; Nils, Gullan, Gullbritt Karlsson, Uddevalla; Britta Rehn, Göteborg; Ulla, Franko, Janko Luin, Tyresö; Birgitta, Annica, Anders, Johan Åberg kun familioj, Skövde; Oddvar Haugen, Göteborg; Emma Linneros, Göteborg; geamikoj Lennart Nilsson, Ingela Bergendahl, Gunnar Lundgren, Lars Göran Baatz, Leif Glick, Britt-Marie Andreasson, Marstrand; Birgit Dolck; Olle Lindvall, Skövde; Märta Gustavsson, Olofstorp; B. Lindahl, Göteborg; L.H.Tychobrah, Göteborg; Göteborg och Bohus distrikt av Svenska FN-förbundet; Jan k Agneta Åberg, Skövde; Anna, Gunnar, Alice Forsell, Bromma; Göteborg-Alliansen; Märtha Andréasson, Göteborg; Majken Svensson, Göteborg.

Märtha Andréasson

## Sommar igen!

*Nu passar det  
bättre än någonsin att ha en*

## esperantotröja på sig!

T-tröja, vit	
storlekar M, L, XL, XXL	100 kr
T-tröja, grå	
storlekar M, L, XL, XXL	100 kr
Piké med krage, vit	
storlekar M, L, XL, XXL	150 kr



*"Pratbubblan"  
är motivet på  
tröjorna*

Esperanto i Väsby

Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby  
Tel. 08-590 882 10 · Fax 08-590 864 61



## KLUBO 1000

Leif Nordenstorm,  
Boden, 1000 kr

## KLUBO 100

Alice k Nils Johanson, Norrköping, 400 kr  
Ivar Andersson, Tranås, 100 kr  
Leif Holmlund, Skellefteå, 100 kr  
K.H.Persson, Motala, 100 kr  
Ivar Andersson, Hälleforsnäs, 100 kr  
Tore Gustavsson, Skövde, 200 kr  
Brita Lindeberg, Malmö, 100 kr

## DONACOJ

PRO 90-JARIÇO  
DE SEF  
Klubo Esperantista de Malmö, 1 000 kr  
Ingemar Nordin, Stockholm, 1 000 kr

TESTAMENTE  
SEF ricevis tri testamentajn donacojn de membroj, kiuj forlasis nin:

William Malmsten, Göteborg, 10 000 kr,  
Alide Leijder, Linköping, 10 000 kr,  
Erik Svärd, Malmö, 5 000 kr. Krome Svärd testamentis 10 000 kr al la klubo de Malmö.

CETERAJ  
Malmö Esperantoförening (memore al Ove Krantz), 300 kr  
Beda Löffler, Lidköping, 150 kr  
Göran Lundgren, Stockholm, 150 kr  
Alingsås Esperantoklubb, 432 kr  
Anonime, 400 kr

SEF dankas por ĉiuj donacoj. Pliaj donacoj estas bonvenaj al postĝiuro 20 12 - 3.

## Korean ordförande i Internationella Esperantoförbundet

Vid förra årets kongress i Tammerfors avgick professor **John Wells**, lingvist vid London University, efter sex års ordförandeskap. Ny ordförande är en välrenommerad och världsvan professor från Sydkorea, **Lee Chong-Yeong**. Han har arbetat i internationella miljöer, bland annat för FN i Italien och New York. Hans specialitet är ekonomi och internationell handel.

Han har kunnat esperanto sedan många år och vet vilken lättnad det skulle bli för internationella organisationer, om de accepterade officiellt i sina internationella kontakter.

Lee-Chong-Yeong tog 1994 över ordförandeskapet i Sydkoreas Esperantoförbund. Hans företrädare var chefen för ett försäkringsbolag, tidigare general i armén. Några år tidigare satt rektorn för det stora Dang-Gook-universitetet ordförande. Det behöver kanske inte påpekas att esperanto har ett visst anseende i detta land.

Fyra universitet har esperanto på programmet, så det finns några docenter som undervisar och lever på att en del studenter väljer detta språk.

## Esperanto på räls

Den internationella järnvägsorganisationen har samlat 15000 facktermer på vart och ett av tolv språk i ett nytt lexikon. Ett av de tolv språken är esperanto. IFEF, det internationella förbundet för järnvägsanställda esperantister ansvarar för den esperantospråkiga delen av ordboken. Lexikonet ligger på CD-ROM och uppdateras kontinuerligt.

## Tolfri vecka i Danmark

Martinus Center i Sjaelland arrangerar varje sommar internationella kursveckor om den danske filosofen Martinus. Under dessa tolkas föredragen till ryska, engelska, tyska och holländska och ibland till esperanto, och studiegrupper hålls på respektive språk. Men i år följs de traditionella internationella veckorna av en vecka helt på esperanto. Det innebär att folk från hela världen kan höra alla föredrag och välja studiegrupp efter intresse, och inte efter

språk. Och tolkarna kan ligga på standen och bada i havet!

## Albanien med esperanto-turism

Ett litet land som under många år varit isolerat från övriga världen, har nu på några år, sedan diktaturen föll, börjat söka internationella kontakter. Esperanto är inte längre förbjudet.

Det dröjde inte länge innan det annonserades om esperantokurser. Lärobok trycktes och ordlistor har blivit till ordböcker. Nu finns det ett nät av esperantister, och de annonserar om esperantokonferenser och turistresor med esperantokunniga reseledare. Internationella Esperantoförbundet har nu representanter i tre städer, vilket framgår av förbundets speciella adressbok över platsrepresentanter.

## Lagförslag om esperanto i Brasiliens skolor

I september i fjol fick fullmäktigeförsamlingen för det federala distriktet Brasilia många brev angående lagförslaget 912/95, om ett gradvis införande av esperanto som valbart studieämne i grundskolor och gymnasier.

Den federale ordföranden hade först försökt stoppa förslaget av budgetskäl, och med hjälp av sin vetorätt. Detta ledde till en fördjupad genomgång, och följden blev att förslaget antogs med 19 röster för, en emot och en nedlagd.

Ordföranden hade förstätt att införandet av esperanto skulle kunna fungera utmärkt utan extra kostnader. Därmed uppmånade ordföranden att förslaget skulle godkännas.

## Spritism och esperanto? Ja, i Brasilien

Sant eller ej, men det finns en del människor runt om i världen som tror att vi som ännu lever kan få kontakt med de avlidna. Intresset för sådan verksamhet tycks vara ganska stort i Brasilien.

Varför spiritister i Brasilien visar stort intresse för esperanto, lär det finnas en och annan förklaring till, men det bör ju räcka som förklaring att det finns en hel del internationella kontak-

ter mellan spiritister.

Internationella Spiritistfederationen hade världskongress i Brasilia, under första veckan i oktober, med deltagande från 32 länder. Esperanto var ett av kongressens fyra officiella språk för de 2700 kongressdeltagarna. Samtidigt fanns det en esperantoutställning.

Inom det officiella programmets ram hölls två föreläsningar om just esperanto. Utställningens hela lager av läroböcker och ordböcker såldes ut.

## UNESCO uppmanar till information

Två gånger har UNESCO antagit resolutioner till förmån för esperanto. En resolution kom 1985, där man uppmanade medlemsländerna att informera om esperanto i alla skolor. Länderna har ingen skyldighet att följa sådana uppmaningar, och troligen är det bara ett fåtal som överhuvudtaget gjort någonting. I år har dock det italienska departementet för utbildning skickat ut information till skolorna om esperanto.

Utöver en del annat på esperantofronten har UNESCO bidragit till finansieringen av en speciell esperanto-lärobok för ett internationellt projekt i flera länder.

## Esperantist i EU-kommisionen

EU-kommisionären för fiskafänge, konsumentskydd och humanitär hjälp är en aktiv förespråkare för esperanto. Hon heter **Emma Bonino** och representerar det radikala partiet i Italien. Hon menar att ett långsiktigt och målmedvetet politiskt arbete är avgörande för att världen skall kunna uppnå språklig demokrati.

Nästa nummer al *La Espero* kommer att ha en längre intervju med Emma Bonino.

## Esperanto hjälper andra språk

Ännu en gång har försök visat på att undervisning i esperanto gör inläring av andra språk mer effektiv. Nyligen avslutades ett försök i 4 grundskolor i Österrike, Kroatien och Slovenien. Resultatet efter ett år var att de som lärt sig esperanto hade 30-35% bättre resultat i engelska och tyska.



### Esperanto är bra, tycker Johan

saxat ur Kamratposten 4/1996  
(Intervjuare: Elisabeth Adelsköld, titel: Esperanto är världens språk! - Johan kan prata med ryssar och japaner):

–Det är praktiskt med esperanto, säger han. Man kan ha en brevvän i vilket land som helst. Ändå förstår man varandra! Jag funderar på att börja skriva till någon i Japan, för jag gillar origami, konsten att vika papper.

...  
Allt började med Johans föräldrar. Eller snarare med hans mormor. Hon gick på kurs i esperanto och lärde sina döttrar. Johans pappa och mamma möttes på en esperantokongress i Budapest i Ungern. Så småningom hölls bröllop på både ungerska och esperanto!

...  
Johan är ovanligt språkkunnig, utan att behöva anstränga sig. Samma gäller hans två yngre systrar. De språk man pratar hemma går ju in i huvudet utan att man tänker speciellt på det.

...  
För att det inte skall bli rörigt har man ett visst system hos familjen Svenonius. Svenska med pappa, ungerska med mamma. Esperanto med föräldrarna tillsammans, för det talar de mest med varandra.

...  
–Det verkar vanligare med esperanto i Ungern än här. När vi var på esperantoläger var det flera familjer som var som vi: föräldrarna talar olika språk men esperanto tillsammans.

–På läger träffar man barn från olika länder. Ändå kan alla prata med varandra!

Det är bra, tycker Johan.

### En tänkbar lösning

saxat ur Jönköpingsposten 26/2 1996:  
(ur helsidesartikel av adjunkt Rolf Nordström med titeln "Esperanto – en tänkbar lösning på språkproblemet i de internationella relationerna")

Att vid sidan av sitt modersmål ha ett internationellt språk som är neutralt kan tyckas vara en utopi, men med tanke på att esperantos struktur har visat sig mycket lättillgänglig inte bara bland människor tillhörande den indoeuropeiska språkgruppen utan också i till exempel Kina och Japan, är det snarare en fråga om fördomar som ligger i vägen för ett allmänt accepterat och internationellt språk.

Ett gemensamt språk skulle under-

lätta fredsarbetet och sökandet efter samförstånds lösningar över gränserna inte bara enskilda människor emellan utan också mellan olika folk. Tänk bara vad det skulle innebära om man kunde vända sig till en internationellt stor publik utan den fördröjande och kostsamma omvägen över en mängd mer eller mindre bra översättningar!

### "Ett mycket, mycket välgjort språk"

I en intervju i fransk radio har den kände italienske författaren och vetenskapsmannen Umberto Eco uttalat sig på nytt om esperanto:

"... Jag har tittat närmare på alla dessa utopier om att skapa det perfekta språket... fram till de språk man kallar universella, som esperanto, volapük med


flera, som inte är avsedda att vara perfekta språk, utan hjälpspråk. Vid detta tillfälle studerade jag även esperantos grammatik för att få en inblick i vad det handlade om, och jag kom till två slutsatser:

Det är ett mycket, mycket välgjort språk. Ur lingvistisk synpunkt följer det verkligen beundransvärda kriterier vad gäller språklig ekonomi och effektivitet.

För det andra: Alla rörelser för internationella språk har misslyckats, utom esperanto, som förenar människor från hela världen, eftersom det bakom esperanto finns en idé, ett ideal. Jag menar att Zamenhof inte bara konstruerade ett språkligt objekt, men att det bakom detta fanns en idé om jämlik gemenskap och fred, och kraften från detta ideal – för vilket esperantisterna till och med förljts under nazismen och stalinismen – bevarar fortfarande deras gemenskap. Man kan inte säga att esperanto misslyckats. Men man måste notera en sak: Orsaken till att ett språk lyckas går aldrig att definiera."

## Vi bezonos ĝin en Prago!

*Lernu la plej kutimajn ĉebajn vortojn jam antaŭ via ekveturo al UK.*



240-paĝa poŝvortaro – nur 120 kr!

Sendkostoj kaj varimposto enkalkulitaj.

**ESPERANTO-CENTRO**

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm  
Tel. 08-34 08 00 • Fakso 08- 34 08 10



# La nuancoriĉo de Esperanto

*Unu el la prelegantoj en la ĉijara seminario de Sveda Esperanto-Instituto, kiu okazis en Popola Altlernejo de Karlskoga, estis Otto Prytz. Lian prelegon ni publikigas ĉi-apude.*

Mi povas malkaŝi, ke la inspiron al ĉi tiu prelego donis al mi Karlskoga mem, malgraŭ la fakto, ke mi neniam estis tie! Mi klarigu:

En decembro 1994 en la Esperanto-klubo de Oslo oni prezentis pupteatraĵon pri la vivo de Zamenhof, vidbendigitan ĝuste en Karlskoga. Tie mi aŭdis la anoncojn "unua scenejo", "dua scenejo" ktp., kaj mi pensis: "Jen etnolingva influo". En multaj lingvoj oni uzas la saman vorton, en la sveda "scen", por indiki kaj agon kaj la ejon, kie oni ludas la agon. La esperantistoj konscias, ke por nomi la ejon oni devas aldoni al la radiko la sufikson "-ejo"; sed la etnolingva influo igas ilin uzi la kunmetaĵon ankaŭ kiam oni ne parolas pri la ejo, sed pri la ago.

Estas multaj similaj kazoj. En multaj lingvoj la vorto "station" signifas i.a. lokon, kie haltas trajnoj; sed ĝi ankaŭ signifas la domon, kie situas la biletovendejo, la atendejo, la oficejoj ktp. Tiun domon la esperantistoj delonge kutimas nomi "stacidomo"; sed sub influo de la etnaj lingvoj multaj tendencas nomi "stacidomo" ankaŭ la stacion ĝenerale: "Degerfors estas stacidomo ĉe la linio Oslo-Stokholmo". Kompreneble domo apartenas al la stacio de Degerfors, sed se oni ne volas paroli nur pri la domo, sed pri la stacio, sufiĉas diri "stacio", laŭ la "principo de sufiĉo kaj neceso".

Ĉi tiuj ekzemploj montras, ke la lingvovozantoj emas trakti kunmetitajn vortojn kiel unuojn: "scenejo" estas kunmetaĵo de radiko kaj sufikso, "stacidomo" de du radikoj. Tial la unuvorta kunmetaĵo "dometo" elvokas la ideon de io, kio ne estas domo en la kutima senco, sed prefere kabano, dum la samaj elementoj, aranĝitaj duvorte en "eta domo", elvokas la ideon de ordinara domo, kiu estas malgranda.

Kelkaj kunmetaĵoj tiom enradikiĝis, ke ili nun estas komprenataj kun signifo pli malvasta ol ili logike havas. "Lernejo" logike estas ĉiu ejo, kie oni lernas; sed oni ĝenerale donas al la vorto la signifon de ejo, kie okazas regula instruado. Eĉ pli ilustra estas la kazo de "preĝejo", kiu logike estas "ejo, kie oni preĝas". Do la vorto devus esti egale applicablebla al kristana katedralo, islama moskeo, budhana aŭ hindua templo, juda sinagogo ktp. Sed eŭropcentrisma pensado, espereble nekonscia, rezultigis, ke tiun vorton akaparitis por si la kristanoj. Cetere, en Norvegio ekzistas laikaj kristanaj movadoj ekster la ŝtata eklezio, kies anoj preĝas ne en la "preĝejoj", sed en apartaj ejoj, kiuj nomiĝas "bedehus", do "preĝdomoj".

Restante iom ĉe lernejoj kaj preĝ-

ejoj, kaj revenante al la ĉeftemo de ĉi tiu prelego, mi menciis, ke en multaj etnaj lingvoj "lernejo" kaj "skolo" (ideologio) esprimiĝas per la sama vorto; la samo validas pri "preĝejo" kaj "eklezio" (organizaĵo). Sed ŝajnas, ke la esperantistoj ne ĉiam estas kontentaj pri tia klareco, kaj ili konscie enkondukas en esperanton la plursencecon kaj svagecon de la etnaj lingvoj: "redakcio" povas signifi kaj redaktejon, kaj redaktistaron, kaj redaktadon. Mi ne tro forte kritiku tiun tendencan, ĉar foje mi mem spertis la mankon de nepreciza vorto en esperanto: dum renkontiĝo de blindaj esperantistoj okazis ŝakturniro gvidata de sveda ne-esperantista akompananto, kaj mi devis traduki unu lian komunikon, kiu komenciĝis jene: "Turneringsledningen har bestämt att...". Li tre intence uzis la formon "ledningen", kiu povus signifi gvidantaron, gvidejon, gvidadon ktp., kaj li volis per tio nebuligi la fakton, ke li estis la sola gvidanto. Mi malerte tradukis la komunikon tiam, sed hodiaŭ mi eble dirus: "El la turnira gvidejo komuniĝas decido, ke...".

Unu el la plej malnovaj ilustraĵoj de la nuanciga supereco de esperanto kompare kun la etnaj lingvoj estas ĝuste "malnova", kontraste kun "maljuna". Sed tiu nuanciga kapablo evidente embarasis kelkajn esperantistojn, kiuj volas, ke la etnolingva plursenceco rekreiĝu ankaŭ en esperanto, kaj tial enkondukis la vorton "olda". Mi rifuzas kredi, ke ili tion faris nur por eviti malvortojn, ĉar anstataŭ "malnova" ili povus diri "antikva", kaj anstataŭ "maljuna" ili povus diri "aĝa".

Ni ne forlasu la aĝon: la skandinava "ungdom" povas signifi kaj "junecon" kaj "junulon" kaj "junularon". Ifoje oni diferencigas en esperanto inter la diversaj sencoj de unu etnolingva vorto per eta vario: "koncerto" estas spektaklo, dum "konĉerto" estas komponaĵo.

Alifoje unu prestiĝa lingvo riĉigas aliajn lingvojn per pruntvortoj. Tiuj vortoj plej ofte havas relative ĝeneralan signifon en la pruntedonanta lingvo, sed nur parto de tiu signifo estas transprenata de la prunteprenantaj lingvoj. Bona ekzemplo estas la vorto, kies baza signifo estas "polvo". Ĝi estas en la franca "poudre", kiu eniris en aliajn lingvojn nur kun la signifo "kosmetika polvaĵo", esperante "pudro". En la anglan ĝi tamen eniris kun la pli vasta signifo "pulvoro" (io diserigita kvazaŭ polvo), do ĝi inkluzivas kaj la kosmetikan "pudron" kaj la eksplodan "pulvon". Do esperanto havas 4 vortojn devenantajn de la sama radiko, "polvo", "pulvoro", "pudro" kaj "pulvo", por esprimi 4 malsamajn aĵojn, kiuj en kelkaj etnaj lingvoj espi-

miĝas per malpli da vortoj.

Nun ni venas al pli konataj kazoj. En kelkaj etnaj lingvoj planto havas la saman vorton kiel preparaĵo, al kiu tiu planto liveras ingrediencan: "sinapo" estas planto, "mustardo" estas preparaĵo el ĝia semo; ambaŭ svedlingve estas "senap". "Laktuko" estas planto, "salato" estas preparaĵo, kiu enhavas laktukon ofte, sed tute ne ĉiam: mi neniam manĝis kiel deserton fruktan salaton kun laktuko; sed en la dana kaj norvega lingvoj ambaŭ estas "sallad".

Ankaŭ diversajn korpopartojn la etnolingvoj emas kunigi sub sama etikedo, sed ne ĉiuj etnolingvoj kunigas la samajn korpopartojn. La skandinava "hals" povas signifi kaj "kolon" kaj "gorgon". La sveda "bröst" povas signifi kaj "bruston" kaj "mamon". La sveda kaj norvega "mage" povas signifi kaj "ventron" kaj "stomakon". La rusa "ruka" povas signifi kaj "brakon" kaj "manon". Kurioze, ankaŭ en mia nordnorvega dialekto, kie ekzistas kaj "hajnn" (mano) kaj "arm" (brako), oni ofte uzas "mano", celante brakon: "Li rompis la manon"; "Mi ŝvitas sub la manoj" = en la akseloj. Iu simila okazas pri "kruro" ("gambo?") kaj "piedo". La rusa "noga" signifas ambaŭ, same kiel mia nordnorvega "fot".

La piedo portas min al kelkaj unuoj de mezuro, pezo kaj mono. La mezurunuo, kies bazo estas la piedo, nomiĝas en esperanto "futo". "Funto" estas pezunuo egalanta proksimume al duona kilogramo, kaj la funto da oro aŭ arĝento, kiun oni uzis kiel pagon, transformiĝis kun la tempo en la mon-unuon "pundo".

En ĉiuj ekzemploj, kiujn mi menciis, la diversaj "signifoj" de la etnolingva vorto estas partoj de unu ĝenerala signifo. Tiel certe estis origine ankaŭ ĉe la sveda "ben", kiu signifas kaj "oston" kaj "kruron", same kiel ĉe "huvud", kiu havas kaj la konkretan signifon "kapo" kaj la figuran "ĉef-", kies esperanta formo estas la franca rezulto de la latina "caput", kiu en la franca perdis sian originan signifon de korpoparto. Tamen tiuj signifopartoj estas sufiĉe malsamaj, por ke ili ne estu intermiksataj de la svedaj esperantistoj.

Oni povas konkludi, ke malgraŭ la malgranda vortprovizo de esperanto kompare kun tiu de la etnaj lingvoj esperanto taŭgas por diferencigi kelkajn konceptojn pli trafefe ol la etnaj lingvoj. Alia demando estas, ĉu la esperantistoj kapablas ekspluati tiujn kvalitojn. Oni devas konsciigi ilin, kaj espereble mia prelego povos kontribui al tio.

Otto Prytz



Sten Svenonius  
Vendelsfridsgr 4C  
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

# Ankaŭ sveda KELI jubileis

SEF festas sian 90-jariĝon ĉijare. *Kompare kun ĝi la sveda sekcio de KELI estas preskaŭ junulo: pasintjare ĝi, kaj la samaĝa finna sekcio, festis siajn 60-jariĝojn. El pli longa artikolo ni ĉerpas kelkajn paragrafojn pri la unuaj agadjaroj.*

... Proksimiĝis la jaro 1934, en kiu la UK estis okazonta en Stokholmo. Ankaŭ Arthur Wallin aktiviĝis. Post preparaj artikoloj aperis en decembro 1933 de lia mano en *Juniorledaren* "Kort esperantokurs". En la halo de la kongresejo, la parlamenta domo en Stokholmo, staris bele aranĝita KELI-tablo sub atentotira granda KELI-insigno, pentrita de Ivar Karlsson. Tie deĵoris Inga Kristoffersson. La diservon de dimanĉmateno en Storkyrkan ĉeestis pli ol 600 personoj. Predikis pastoro Algot Törnqvist el Gävle. La fakaj kunvenoj de KELI estis viglaj kaj sep landoj estis reprezentitaj.

En al vendreda vespero Arthur Wallin, en la nomo de Sveda Misia Federacio (SMF) invitis al speciala interkristana vespero de frateco en Immanuelskyrkan. Ĉeestis proksimume 175 personoj. Wallin kaj Karlsson gvidis. Pastoro Furhammar parolis pri "La religiaj cirkonstancoj en Svedujo". Je la fino ĉiuj ricevis la paroladon, iom pli ampleksan, en bele presita libreto.

Post la kafo parolis Hübner, Carlén kaj pastoro Sandmark. En la vintra kurso de Arthur Wallin partoprenis Anna Henriksson. La 10-an de januaro 1935 okazis la fondkunveno en la domo de

Inga Kristofersson. La unua estraro konsistis el: Gunnar Furhammar, Ivar Karlsson, Arthur Wallin, Inga Kristofersson kaj Erik Carlén.

Malgraŭ ĉia aktiveco la sekcio havis fine de 1939 ne pli ol proksimume 100 membrojn. Inter la plej aktivaj estis Anna Henriksson. La 2-an de septembro 1939 ŝi edziniĝis al alia membro de la stokholma grupo, Fritz Alamo. Sub la nomo Anna Alamo la mondo ekkonis ŝin.

Dum la milito du teruraj batoj trafis la svedan sekcion. La 22-an de novembro 1942 mortis Fritz Alamo post kelkmonata malsano. La 4-an de marto 1944 mortis pastoro Furhammar.

Erik Carlén proponis al Anna, ke ŝi fariĝu esperantista misiistino. Ŝi estis dungita de KELI kiel vojaĝanta sekreta-riino.

La unua rondvojaĝo okazis en la sveda provinco Skanio, pro la venonta UK en Malmö en 1948. La temo de la prelegserio estis: "Kun svedaj donacpajloj tra Nederlando". Somere 1947 ŝi estis en Ĉeĥoslovakio kun "Svedio, mia hejmlando"; ŝi parolis en 60 kunvenoj, kelkfoje antaŭ miloj da homoj.

Laŭ instigo de Erik Carlén sveda KELI invitis de Hoog el Amsterdamo instrui kaj poste fari rondvojaĝon al diversaj lokoj en Svedio.

En barakaro por rifuĝintoj, posedaĵo de SMF kaj parte de la emerita estro Axel Andersson, okazis la unua postmilita somerkurso de KELI. Li invitis KELI aranĝi la unuan kongreson en la jaro 1948.


Por ni svedoj, kiuj partoprenis en Tostarp, estis agrabla antaŭkongreso de la granda UEA-kongreso en Malmö. Anna fianĉiniĝis kun Karl-Olof Sandgren dum la KELI-semajno kaj mi ekkonis nederlandan junulinon, kiu poste fariĝis mia edzino. La nederlandanoj ne rajtis kunporti pli ol 25 kronojn; cetere ni svedoj regalas ilin. Por la tranoktado en Malmö mi multe helpis, ĉar tiam mi loĝis tie kaj ĵus lernis esperanton por povi partopreni la UEA-kongreson.

Arne Lundkvist

(La plena teksto estas legebla interrete je: <http://www.esperanto.se/espero/keli60.html>)

Lennart Persson

## KRUCVORTA ENIGMO 96/2



### Horizontale

- 1 Iris tri en suno, laŭ Fröding
- 2 Manĝas multaj en Azio – Ringoforma
- 3 Funkciis – Akvoarkan
- 4 Nepohavanton – Demandovorto
- 5 Duone sala – Ĝeni (radiko) – Prefikso por komenco
- 6 Science nov- – Duono de diurno
- 7 Malsekaj – Homoparton
- 8 Sukcesos en la serĉado
- 9 Ne via – Li logas
- 10 Festotago – Malmola histo

### Vertikale

- A Vokas laŭte – Detru'  
 B Celo en budismo – Blek' de azeno  
 C Granda parto de la mondo – Ekzistas  
 Ĉ Lando sur eŭropa duoninsulo  
 D Femal' – Teksaĵo  
 E Japana insulo  
 F Li estas eksperto pri birdoj  
 G En kolĉeno – Uzas la lipojn  
 Ĝ Malgranda virino – Nova testamento  
 H Indiĝenon

## SOLVO DE 96/1

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	P	E	N	T	A	G	R	A	M	O
2	E	T	E	R	N	A	■	N	A	S
3	N	I	P	O	N	■	K	A	R	T
4	S	K	A	L	A	■	A	L	O	E
5	I	E	L	■	U	N	O	■	T	
6	O	T	O	M	A	N	O	■	P	O
7	N	O	■	A	M	I	N	D	A	J
8	A	N	I	M	■	K	O	R	T	
9	T	■	L	■	M	A	J	O	R	O
10	O	P	O	N	I	S	■	G	O	N